# BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA XIX. URALSKÉ NÁM. 447.

NUMERO 49. — MARTO 1933.

Invito al la

## XIV. ĝenerala kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista

okazonta en Hradec Králové dimanĉon, la 19-an de marto 1933 je la 8-a horo matena en restoracio Adalbertinum.

Programo:

1. Protokolo de la lasta ĝen. kunveno.
2. Raporto pri la agado kaj pri la kaso.
3. Raporto de la revizoroj.
4. Asocia organo.
5. Internacia reorganizo.
6. Elektoj por vakiĝintaj lokoj komitataj.
7. Liberaj proponoj. (Sendotaj ĝis la tria tago antaŭ la kunveno.

La komitato.

Atentu, ke la dato estis ŝanĝita kontraŭ la provizora alvoko!

Rimarko: Laŭ § 16-a de la statuto membroj ne povantaj ĉeesti persone povas reprezentiĝi sin per iu ĉeestanto. — Laŭ § 17-a la kunveno estas decidrajta, se partoprenas almenaŭ kvarono de la membroj (persone aŭ reprezente). Se ne kunvenis tiu nombro, okazas post unu horo nova kunveno, kiu estas decidrajta sen atento de la nombro.

Sabaton la 18-an de marto ja la 20-a horo okazos en la sama ejo

### Amika vespero

aranĝita de la Esperantista Klubo en Hradec Králové, destinita por interkonatiĝo de partoprenantoj kaj por ilia informo pri la solvotaj problemoj. La tuta vespero estos destinita al amika diskuto, kiun malferos ĉeflingva prelego de Dr. Kamaryt:

„Nuna stato kaj aktualaj problemoj de movado".

Ni invitas tre kore ĉiuj esperantistojn ankaŭ al ĉi vespero.

---

Detaloj: Hotelĉambro unulita kostos Kč 19.50, dulita Kč 32.— (kun ĉio), tagmanĝo aŭ vespermanĝo, tre bonaj, Kč 8.—. Kiu volas veni kaj ne aliĝis ankoraŭ, anoncu tion kun mendo de la hotelĉambro tuj. Jam aliĝis pli ol 80 el diversaj lokoj. Oni povas prave atendi tre bonan partoprenon. Ĉiujn petojn kaj ĉiun ajn korespondaĵon pri la ĝenerala kunveno adresu al Teritoria oficejo en Hradec Králové, 628-a, Masarykovo nám. Je revido kun multaj!

En stacidomo en Hradec Králové ĉeestos sabaton postagmeze samideano por akcepti la gastojn. Kiu lin hazarde ne trovus, iru senhezite kun fluo de homoj al la urbo. Post dek minutoj transirinte la ponton, demandu pri Adalbertinum, kiu estas situita vidavide de Grandhotelo.

# Nia agado en jaro 1932.
## Raporto por la XIV. jara kunveno de ĈAE okazonta 19. II. 1933 en Hradec Králové.

### Samideanoj!

Ni prezentas al Vi denove raporton pri agado kaj pri kaso de Via nacia propaganda centro en formo jam kutima. Verkis ĝin la prezidanto laŭ partaj raportoj de la komitatanoj kaj aliaj kunlaborantoj. Ni rekomendas al vi atentan legadon de tiu ĉi raporto. Vi trovos en ĝi, kiom da laboro estis farita kaj kiom nia laboro estas diversmaniera kaj ampleksa. Certe Vi trovos punktojn, pri kiuj vi povus kunlabori aŭ konsili. Atenta legado ebligos al multaj aŭ partopreni en la diskutoj de la ĝenerala kunveno (ĉar oni verŝajne ne insistos pri legado de raportoj, kiujn ĉiu estos ricevinta) aŭ sendi letere al la kunveno siajn rimarkojn aŭ sugestojn. Ni fieras pro fakto ke preskaŭ neniuj sugestoj venintaj al niaj jaraj kunvenoj perdiĝas sen postsigno sed estas pristudataj kaj efektivigataj. Tial ni tiom insistas pri alsendo de proponoj; ni scias, ke ĝi ne estos laboro senefika.

La raporto estas konciza. Ni povis ofte citi informojn donitajn en nia Bulteno, ĉar ni detale raportis pri komitata agado. Do plurfoje sufiĉis revoko laŭ la paĝoj de pasintjara kolekto de La Progreso.

Impreso, kium havas ni el la diversaj laboroj kaj entreprenoj, estas, ke venas nova ondo de intereso pri nia movado, ke venas novaj homoj pretaj labori, repreni la flagon kaj ekstari sur postenoj, kiuj, jam ŝajnis malpleniĝantaj pro laceco de kelkaj malnovaj gvidantoj. Tiuj novaj pioniroj estu precipe salutitaj de ni ĉe tiu ĉi okazo!

### 1. Konsisto de la komitato.

La komitato elirinta el la ĝenerala kunveno per plenigo de vakiĝintaj lokoj (la listo estas sur p. 46) dividis la funkciojn tuj en la unua komitata kunveno okazinta post la kunveno ĝenerala. La divido estas sur p. 45. Tie ĉi estu menciite ripete, ke oni provis novan aranĝon dividinte la ĝistiaman funkcion de la ĝenerala sekretario kaj de la du sekretarioj en funkciojn kvar nome: estro de la Asocia oficejo, kiun akceptis s-o Slavík kaj tri sekretarioj (gesinjoroj Šustr, Herzigová, Tarantíková). Sed ĉar la polica direkcio postulis, ke la penigo de la funkcioj okazu precize laŭ normoj de la statuto, bonvolis s-o Šustr akcepti ankaŭ reprezentain devoin antaŭ publikjuraj aŭtoritatoj. Apartan mencion meritas la fakto, ke plenumadon de gravaj kaj daŭraj laboroj akceptis tiun ĉi jaron du membroj, kiuj ne estas komitatanoj. S-o Ginz, kiu krom gvido de gazetara kaj radio-komisionoj kunlaboris, ankoraŭ pri diversaj malfacilaj kaj tempo-rabaj taskoj, kaj s-o Echtner, kiu dum la jaro akceptis gvidon de Junulara komisiono nove kreita. Estas tre agrabla devo de la komitato danki publike al ambaŭ samideanoj pro tiu ĉi imitinda kunlaboro kaj ekzemplo. Klopodo trovi inter membroj kunlaboranton, kiu prenus sur sin administron de ekspozicia materialo kaj fondajn laborojn por Asocia arĥivo restis spite diversaj promesoj sen rezulto. Ŝajnas al ni taŭga okazo ankau tie ĉi inviti bonvolan kunlaboranton anonci sin al ni. Li helpus multe per laboro facila kaj agrabla. La nova aranĝo de la komitata kunlaborado montriĝis tre taŭga kaj utila. Certe gravan meriton havas pri tio s-o Slavík. ku plenumadis taskon akceptitan prudente kaj akurate.

### 2. Komitataj kunvenoj

okazis 11. La unuan prezidis Kamaryt, ĉiujn ceterajn dr. Pitlik. Ĉeesto de la komitatanoj estis ĉiam kontentiga, neniam okazis, ke kunvenus sole nombro nedecidpova laŭstatute. Ankaŭ kunlaboro de la komitatanoj ekster Praha estis tre vigla. De la prezidanto kaj de la kasito venis por ĉiu kunveno leteroj kun informoj kaj proponoj; ankaŭ la ceteraj komitatanoj kontakttis kun ni ofte kaj kun rezultato. Ankaŭ tiun ĉi jaron estis sendataj kopioj de protokoloj al ĉiuj neĉeestintaj komitatanoj. Tiun laboron plenumadis regule f-ino Tarantíková.

### 3. Membraj kunvenoj

tiun ĉi jaron ne okazis. Ilian funkcion prenis sur sin regionaj kunvenoj kunvokitaj de la Teritoria oficejo de UEA en Mladá Boleslav kaj Lázně Bělohrad. En ambaŭ ni estis reprezentitaj de ĝenerala sekretario. Ankaŭ agado de tiuj kunvenoj estas pozitiva dokumento pri utileco de kunlaboro inter nacia centro kaj UEA same kiom pri bezono kaj utileco de paralela laboro de la ambaŭ direktoj en nia movado.

### 4. Administrado.

La divido de la laboro laŭ komisionoj restis en la pasinta jaro preskaŭ la sama kiel en la jaro antaŭa Administro de membroj (Sklenčka), Financaj aferoj (Sklenčka), Lernejaj aferoj (Kamaryt), Gazetara servo (Ginz), Radio (Ginz), Turismo (Pitlik), Sciencistaj aferoj (Kamaryt), Literaturo (Hromada), Ekspozicia materialo (Šustr), Redaktado de Bulteno (Hromada), Junularo (Echtner). La lasta komisiono estis starigita dum la jaro. Krom la komisionoj funkciis aparta sekcio studenta. Sed en mezo de la jaro foriris ĝia estro s-o Vlast. Sedláček el Praha kaj ne povis plu prizorgi ĝiajn aferojn. Ni esprimas al li sinceran dankon pro la laboro farita en tiu ĉi sfero tre grava kaj aivokas afable kaj sincere samideanojn — studentojn, ke eliru el ili nova gvidanto reprenonta flagon de gvidanto.

Nia multobliga aparata estas daure ĉe s-o Slavík, kiu laboras kun ĝi kaj faris escepte du ĉiujn ceterajn cirkulerojn de ni sendatajn. Nia skribmaŝino estas ĉe ĝen sekretario.

Ni fondis novan apartan Oficejan fondajon, por kolekti kaj administri en ĝi monon, kiun ni uzos por iuj taŭgan oficejon kaj aĉeti oficejajn maŝinojn kaj meblojn; ni intencas taŭgatempe malfermi kolektadon de mono por tiu fondaĵo. Pri Ekzamena fondaĵo ni starigis regularon. Ambaŭ regularoj estos publikigitaj.

Da leteroj estis forsendite kune 1481, da presaĵoj 2157. Koncernaj numeroj en jaro antaŭa estis 1194 kaj 1195. Ankaŭ ili montras novan pliampleksigon de nia agadkampo. Ankaŭ tiun ĉi jaron ne estas enkalkulitaj en la nombro da presaĵoj la cirkuleroj; ilia sumo aperas en alineo pri publikiga agado.

### 5. Ekspozicia materialo

(komision-estro J. Šustr). La intereso pri ĝi ne estis dum la pasinta jaro tro viva. Pruntita ĝi estis al Olomouc kaj al Košice; en tiu ĉi urbo ĝi bone servis kiel

parto de la E-stando en Ekspozicio de la monda preso. Nia komitatano J. Friedrich kaj liaj kunlaborantoj meritas esti nomitaj ie ĉi pro la sukceso, kiun havis la stando de ili iniciatita kaj farita en la ekspozicio. Kvanto de materialo estis donacita al s-ro Žikovský en Záběhlice por propagandaj celoj kaj al Asocio de slovakaj skoltoj en Bratislava por migranta ekspozicio. Ni ripetas sur tiu ĉi loko inviton, ke anoncu sin bonvola kunlaboranto, kiu volus akcepti administradon de la ekspozicia materialo, ĉar la ĝisnuna funkciulo estas tro okupita de aliaj gravaj taskoj.

## 6. Korespondantoj

(důvěrníci) de la Asocio. Ni dankas al tiuj niaj membroj, kiuj siatempe proponis al ni sian kunlaboradon por tiu ĉi tasko. Sed ni decidis ne plu daŭrigi en tiu ĉi klopodado. Ĉar se ni bezonas turni sin al iu loko por priesperanta informo, ni povas ĉiam turni nin al delegito, kiu tamen nenian faras diferencon inter servo „praktika" aŭ „propaganda". Kie oni sukcesis trovi delegiton bonan, ofereman kaj kapablan, tien oni povas sendi peton pri kio ajn koncernanta movadon. Kaj kie Teritoria Oficejo ne sukcesis trovi inter esp-istoj tian homon, tie ankaŭ ni ne trovus taŭgan homon, kiu preferus servi ekskluzive „propagande" kaj rifuzus servi „praktike". Iu speco de korespondantoj laborantaj en tiu funkcio ekskluzive por nia, t. e. propaganda, celo estas kunlaborantoj de la Gazetara servo, da kiuj estas ĉ. 150. Ili akceptu nian sinceran dankon pri ilia persistema oferemo kaj peton resti fidelaj al tasko bonvole akceptita. Dum la nuna situacio en la movado ne malutilos diri, ke ankaŭ tiuj ĉi konstatoj argumentas por konvinko, ke multaj iloj de UEA kaj de nacia societo estas uzeblaj por la ambaŭ celoj te profitige, sed ke tamen administrado laŭ du diversaj manieroj estas treege utila.

## 7. Informado pri esperantistaj entreprenoj en nia lando.

La pli granda intenseco de la propaganda agado kaj nia daŭra koresponda kontakto kun multaj aktivuloj kaŭzis, ke ni ricevas rimarkinde pli multajn informojn pri la enlanda vivo, kiujn ni uzis por sciigoj en la kronika parto de la Bulteno. Bedaŭrinde denova subita paŭzo en eldonado de Progreso kaŭzis, ke ne ĉiuj sciigoj al ni venintaj povis esti uzitaj por tiu ĉi celo. Sed ĉar nun konvinko pri radikala ŝanĝo en la situacio de la oficiala organo fariĝis tute ĝenerala, ni fidas firme, ke el decidoj de la ĝenerala kunveno rezultos daŭra plibonigo. Tial ni tre insiste petas ĉiujn laborantojn, ke ili nepre restu ĉe la kutimo pri raportado, akurata kaj preciza, kiu jam komencas enradikiĝi en iliaj mensoj. Ĉiuj sciigoj, kiuj nin atingas iel ajn, estos utiligitaj por bono de nia komuna afero.

## 8. Varbado de la membroj.

Niaj listoj de anoj venis nun jam en plenan ordon. La membroj kiuj ŝuldis por pasintaj jaroj kaj volis pagi, jam pagis. Al ĉiu kongresano en Olomouc ni donacis kolekteton de propagandiloj kaj varbiloj por nia Asocio. Post la kongreso ni sendis al ĉiuj kongresanoj alvokon aliĝi ĉu resti fidela al nia asocio kaj al UEA. En 11-a n-ro de Teritoria Tribuno estas alineo pri ni. Inter. presaĵoj dissendataj de Teritoria oficejo por varbi al realiĝo 1933 estis ĉeĥlingva aliĝilo por nia Asocio. En la nova propaganda flugfolio jeden jazyk pro celý svět eldonita de Teritoria oficejo estis tuta paĝo pri ni. Samtempa varbado por ĈAE kaj UEA praktikata jam la trian jaron portas bonajn fruktojn. Multaj membroj ŝatas pagi la ambaŭ kotizojn samtempe per unu letero. Kvankam ĝenerale regas krizo en ĉiuj fakoj, nombro de niaj membroj ankaŭ dum la jaro 1932 kreskis. Tio estas fakto ekstreme ĝojiga ĉar ĝi estas argumento por tiu optimismo, kiu asertas, ke laboro apogita sur konvinko pri utileco de celata idealo, ĉ i a m havas rezultaton pozitivan. Aliĝoj venantaj por 1933 promesas jam nun pluan kreskon. Tamen la ciferoj atingataj estas negrandaj. Tial ni bonvenigis ideon de komitatano Friedrich kaj dissendigis al 58 adresoj de grupoj kaj rondetoj alvokon kaj demandaron pri iliaj opinioj kaj eblecoj por membrigo de ĉiuj siaj anoj sub kondiĉo, se oni malaltigus la kotizon asocian. La respondoj estas sendotaj al s-ro J. Friedrich, kiu raportos al la ĝen. kunveno. Kiu grupo ne respondis ĝis nun, nepre faru tion!

## 9. Administrado de la membroj (komision-estro Sklenčka).

Kvankam la nuna kriza tempo forigas multajn, por kiuj nia kotizo de Kč 16 estas sumo grava, ni tamen faru novan paŝon al administra ordo kaj donante statistikon, ni uzu nur ciferojn pri 1932:

1 honora membro
3 dumvivaj membroj
113 membroj pagintaj dum 1930, 1931 por 1932
243 membroj pagintaj dum 1932 por 1932

---

360 stato de membroj 1932 la 31. Decembro 1932

---

322 stato de membroj 1931 la 31. Decembro 1931

---

38 kresko t. e. 11.8 %

---

| | |
|---|---|
| Stato de la membroj en fino de 1931 . . . | 322 |
| el kiuj 2 mortis, 14 eksiĝis, 71 simple ne pagis | 87 |
| pagis por 1932 el ili . . . . . . . . . , | 235 |
| pagis novaj kaj revarbitatj . . . . . , , , | 125 |
| Stato de la membroj en fino de 1932 . . . | 360 |

(La malgrasaj ciferoj pri nia Studenta sekcio ne estas enkalkulitaj. Por 1932 pagis 9 membroj!)

### L a ŭ l o k a d i v i d o d e l a m e m b r o j

73 en Praha
28 en Košice
16 en Hradec Králové
12 en Mladá Boleslav
16 po 8 en Bratislava kaj Olomouc
6 en Brno
5 en Plzeň
16 po 4 en Lazy, Pardubice Přerov, Vyškov
3 en Mnichovo Hradiště
46 po 2 en Bystřice pod Hostýnem, Červený Kostelec, Holešov, Jabloné nad Orl., Jaroměř, Jičín, Kladno Kolín, Komárno, Lázně Bělohrad, Nový Hradec Králové, Nymburk, Orlová, Poruba, Praskačka, Prostějov, Rumburk, Stará Paka, Tábor, Tisovec, Trenčín, Trnava, Třebíč
139 po 1 en 139 malsamaj lokoj de nia lando.

---

360 aktivaj membroj.

## 10. Publikiga agado.

Depost la lasta ĝenerala kunveno aperis numeroj 41—47 de nia Bulteno en la Progreso; entute 44 paĝoj redaktitaj de s-o Hromada, por kiuj ni pagis al Progreso Kč 2687.— Bedaŭrinde la eldonanto de la Progreso ĉesis depost septembro denove regulan aperadon de sia gazeto. Li tion klarigas per troa profesia okupo. Sed ĉar Progreso estas lia tute privata posedaĵo kaj ĉar li permesas al la komitato neniun influon je la eldonado krom pagado kaj senpaga verkado de komitatanoj, ni ne povas ŝanĝi tiun situacion alimaniere ol per tute nova aranĝo. Aŭ preni progreson kiel eldonantoj, aŭ proponi al Ligilo, ke ĝi estu nia organo, aŭ eldoni nian Bultenon sendepende de la gazeto. Venis jam proponoj rekomendantaj ĉiun el tiuj ĉi eblecoj. Ĉar venos verŝajne ankoraŭ pluaj tiaj proponoj, ni raportos pri ĉiuj al la ĝenerala kunveno kaj petos pri ĝia decido en tiu ĉi afero tre grava.

Ni mem eldonis prese

duan eldonon de gvidfolio pri Praha (3000 ekz.)
poŝtkarton kun skiz. landkarto de ČSR. (3000 ekz.)
prop. afiŝon por daura apliko (1000 ekz.)
ĉeĥlingvan aliĝilon al ĈAE (2500 ekz.)

provizoran alvokon por ĝen. kunveno (2500 ekz.)
raporton pri agado 1931, represo el P. (100 ekz.)
invitilon al ĝen. kunveno 1932 (400 ekz.)

La ambaŭ eldonajoj destinitaj por vendo (poŝtkarto kaj afiŝo) estas jam preskau elĉerpitaj, kiu fakto mem dokumentas ilian bezonon.

Ciklostilitajn cirkulerojn ni eldonis sume 20 (en antaŭa jaro 16). Sumo de la paĝoj estas 25 (en antaŭ jaro 21). El tio estas de la Gazetara servo 7 paĝoj (numeroj 14—20). La plej granda eldoncifero de la cirkulero estis 600, la plej malgranda 28. La sumo de la dissenditaj ekz. estas 4046. Komparante ĝin kun la nombroj de la du jaroj antauaj (3810, 3007) oni vidas malrapidan sed dauran kreskon de intenseco, kun kiu ni turnas nin al esperantistaro klopodante pri organizo de nia batallinio.

## 11. Kontakto kun ĉsl. oficialaj aŭtoritatoj.

Ni prezentis al ministrara estraro kaj al ministerioj lerneja, fervoja, poŝta rezoluciojn de la Olomouca kongreso. — Ni petis ministerion de komerco doni al ni subvencion por turisma propagando en fremdlando. La petskribo riĉe dokumentita havis sukceson kaj ni ricevis ankaŭ dank' al kunhelpo de dro Pitlik Kč 5000.—, la tutan sumon, pri kiu ni petis. Ni klopodas uzi tiun ĉi sumon ŝpareme laŭ la buĝeto, kiu ni antaŭmetis al la ministerio. Kaj ni uzas tiun ĉi okazon por danki publike al la komerca ministerio pro la kompreno, kiun ĝi montris por uzo de esperanto en la turisma propagando. Ni jam raportis al ĝi pri partaj sukcesoj kaj ni raportos al ĝi komplete, kiam koncernaj entreprenoj estos fínintaj. — Ministerio por fremdlandaj aferoj plenumis nian peton kaj donis al ni subvencion da Kč 2000.— por dissendo de la Ĉehoslovaka numero de Literatura mondo al taŭgaj adresoj fremdlandaj. Ni tion faris tre zorge kaj firme esperas, ke ankau tiu ĉi ministerio estos kontenta kun la rezultato. Sed ministerio fremdlanda montris komprenon de metodoj, kiujn ni aplikas por politika propagando de niaj naciaj idealoj antaŭ fremdlanda publiko, ankaŭ per aliaj valoraj helpoj. Estas nia tre agrabla devo danki al ĝi por tiu ĉi progresema atitudo, kiun ni tre ŝatas. — Ministraran estraro ni petis reprezentigi nian ŝtaton en la Pariza kongreso per oficisto legacia. Fakte tiel okazis kaj ni dankis al ĝi per speciala letero. — Al la Olomouca kongreso ni invitis ministraran estraron kaj ministeriojn komercan, lernejan, fervojan, fremdlandan. Ĉiuj senkulpigis sin pro nesendo de la delegito per specialaj leteroj. Post la kongreso ni dankis al la urbestraro de Olomouc pro protekto de la kongreso kaj pro nomigo de strato laŭ Zamenkof kaj ni donacis al ĝi por la urba arhivo numeron de la Progreso kun raporto pri la kongreso. — Plenumado de diversaj niaj taskoj montris ofte bezonon turni sin al ministerioj lerneja, komerca, fervoja kaj fremdlanda kun petskriboj kaj memorandumoj jen petantaj, jen protestantaj, jen dankantaj. Ili estis verkataj plejparte de Ginz kaj Kamaryt. Personaj intervenoj estis laŭbezone farataj de Ginz kaj Pitlik. Ĝenerale ni povas danke konstati afablan studadon de niaj sugestoj eĉ se oni ne akceptadis ilin por efektivigo. Kun ĝojo ni konstatas, ke ministerioj fremdlanda kaj fervoja plurfoje turnis sin al ni el propra iniciato kun kaj por informoj esp-istaj aferoj.

## 12. Kontakto kun nia centra organizo.

Ni povas pri nia kontakto kun Internacia Centra Komitato ripeti tion, kion ni diris en nia lasta jara raporto. Ni korespondis kun ĝi ofte pri diversaj temoj kaj ĉiam ni havas firmankonvinkton, ke ĝia ekzisto kaj agado havas tre utilan influon je propaganda laboro. Ni malfacile povas imagi al ni nian laboron sen tia institucio. Ankaŭ kun Universala Esperanto Asocio estas nia kontakto eminenta; tio estas speciale videble en la fakto, ke administradon de niaj membroj kaj de kaso faras Teritoria oficejo de UEA. Tiu arango montriĝis tre utila al ni same al UEA. Por ni ĝi signifas zorgan administradon en oficejo teknike ekipita per modernaj iloj kaj metodoj, por Teritoria oficejo ĝi signifas disponeblecon de ĉiu nia materialo persona por ĝia verbado. Spito la longajn polemikojn malkvietigantajn samideanojn depost la pariza kongreso ni ne povis ŝanĝi nian opinion esprimitan de ni tie ĉi antaŭ unu jaro. Ni ne vidas malhelpon en paralela funkciado de UEA prizorganta la praktikajn aplikojn de la lingvo kaj de ICK organizanta propagandajn laborojn de la naciaj societoj.

En kunvenoj de KR kaj de Ĝenerala estraro dum Pariza kongreso reprezentis nin nia vicprezidanto dr. Pitlik. Sekvante principojn de nia komuno konvinko li balotis kontraŭ propono pri nuligo de Helsinki kontrakto kaj protestis en nia nomo kontraŭ procedo aplikita de la prezidanto de la kunveno. Kun ni protestis ankoraŭ GEL, Belga, Nederlande kaj Svisa societoj. La sintenado de nia reprezentanto estis aprobita de nia komitato per aparta deklaro.

Tiu sintenado kompreneble ne signifas neintereson de ni pri internacia organizo de la movado. Kotraŭe. Tuj kiam venis en julio 1932 reorganiza projekto de s-ro Dubois adresita al prezidantoj de la naciaj societoj, nia prezidanto respondis al li, kvankam la letero estis dissendata, en tempo tre netaŭga, kaj montris al li diversajn aranĝojn de la projekto, kiuj estis laŭ lia opinio eraraj. Ekz. li kritikis uzon de tute simila nomo rezultantan en uzo de mallongigo de UEA sen ĝia anticipa konsento. Eble ankaŭ tiu kritiko iom kontribuis al tio, ke fina projekto havas titolon kaj inicialojn akcepteblajn. Meritas esti dirite, ke nenie ni legis aŭ aŭdis pri tiu ĉi kritiko de nia prezidanto, kvankam Franca societo petis pri ĝi per sia cirkulero. Dr. Pitlik publikigis en „Ligilo" por informo de ĉsl esperantistaro studaĵon pri laŭhistoria evoluo de klopodoj kaj ĝisnunaj rezultoj de internacia organizo. Pluraj niaj komitatanoj korespondis kun diversaj lokoj pri la subite aperintaj problemoj. Kompreneble ni petis ankau ICK pri ĝia opinio. Vizito de UEA direktoro s-o Jakob en Bratislava, Hradec Králové kaj Praha kaj de viceprezidanto de UEA Karsch en Praha donis al niaj funkciuloj precipe al Kamaryt, Pitlik, Sklenčka, Hromada poveblon ricevi ankaŭ de UEA informojn senperajn.

Ni do povos raporti al ĝenerala kunveno tre detale kaj tre fidinde, kaj ni petos ĝin, ke ĝi decidu pri plua sintenado de nia komitato en tiu ĉi situacio, kiun ni ne elvokis. La monon pagotan laŭ malnova sistemo al KR ni havas sur aparta konto tuj pageblan, kaj ni pagos ĝin post kiam estos videbla almenaŭ komenco de nova definitiva aranĝo.

## 13. Kontakto kun la ceteraj naciaj societoj.

La rilatoj inter ni kaj GEL fariĝis ankoraŭ pli oftaj ol pasintan jaron. Pri ĉiuj iom pli gravaj entreprenoj ni estis reciproke informitaj Precipe rimarkinda ŝajnas al ni la fakto, ke komunaj kunvenoj de la ambaŭ komitatoj fariĝas daŭra institucio. Ankaŭ tiun ĉi jaron ili kunvenis, en Olomouc antaŭ la kongeso, sub prezido de s-ro inĝ. G. Scholze, kaj finredaktis kongresajn rezoluciojn al publikaj aŭtoritatoj. — Por iniciati efektivigon de deziro ofte esprimata ni sendis en interkonsento kun ICK al ĉiuj naciaj societoj reprezentitaj en KR nian presitan raporton pri agado dum j. 1931 kun klariganta cirkulero petanta pri konfirmo kaj reciproka sendo. Plenumis nian peton societoj Agentina, Aŭstria, Brita, Franca, Germana, Itala, Japana, Litova, Nederlanda, sume 9 el 28 naciaj societoj de KR. Nia iniciato trovis ĝeneralan aprobon. Kvankam nin ne plene kontentigis la nombro de respondintaj societoj ni rigardas nian iniciaton sukcesinta kaj ni kredas, ke el ĝi rezultos kutimo daŭra, kiu esence helpos al vera reciproka kunlaborado de la naciaj societoj. Iuraj niaj komitatanoj studis dokumentojn ricevitajn kaj trovis en ili diversan inicaton uzeblan ĉe ni. Ni dankas al ĉiuj naciaj societoj respondintaj al nia iniciato kaj firme kredas, ke al la respondintaj aliĝos tiun ĉi jaron pluaj. — Sed tiun ĉi jaron ni korespondis kun la naciaj societoj pli ofte ankaŭ pri aliaj temoj. Tio estas ŝanĝo ĝojiga kompare la jaron antaŭan. Apartan menelon meritas nia respondo al enketo de la Franca societo pri uzo de esp-o en turisma propagando oficiala kaj nia

korespondo kun Jugoslava Ligo pri ĝia intenco kunvoki Beogradon por Pentekosto 1933 sendependan internacian konferencon pri reorganizaj demandoj. — Kun Ĉsl. E-instituto estis kontakto daŭre tre bona ankaŭ dum tiu ĉi jaro. — Depost 1932 ni aliĝis al I n t e r n a c i a E s p e r a n t o M u z e o en Wien kiel membro por 10 jaroj kaj donacis al ĝi diversajn muzeajn dokumentojn.

## 14. Lernejaj aferoj

(komision-estro dr. Kamaryt). Niaj esperoj, kiujn ni ligis kun decido de reforma komisiono por burĝaj lernejoj, nin trompis. Kiam ministerio publikigis la definitivan reformplanon, aperis, ke ĝi preskaŭ tute neglektis la decidojn de la komisiono (nomita „komisiono de ekspertoj", sub prezido de docento Příhoda), ĉar perskaŭ nenio el la rekomendataj novaĵoj en ĝi enestas. Ankaŭ esperanto ne. Same en la reformita plano de la mezaj lernejoj, jam ankaŭ publika, ne enestas esperanto. Al ni restas nenio alia, ol protesti kaj denove repreni nian metodon de konvinkado kaj argumentado. Tion ni jam komencis. Ni protestis per speciala memorandumo kaj preparas detalan memorandumon, en kiu ni ripetos niajn argumentojn. Ni ricevis valoran promeson de „Mezeuropa instituto" (Středoslovenský ústav) en Brno, ke ĝi subskribos tiun ĉi memorandumon. Ni rigardas tion tre valora, ĉar Mezeŭropa instituto estas ĉe ni u n u a grava korporacio, kiu spontanee deklaris postulon, ke esp-o estu enmetita en instruplanon de lernejoj.

La ĝisnunaj permesoj oficiale instrui en lernejoj ankau tiun ĉi jaron ne estis uzitaj ofte, sed tamen. La instruistoj kaj profesoroj, kiuj plenumas tiun ĉi taskon, laboron nedankeman sed ekstreme gravan, meritas nian plej profundan dankon. En alta teknika lernejo en Praha la literaturaj kaj praktikaj ekzercoj de lektoro dro Pitlík daŭras. En j. 1931/2 estis du po 1 kaj 2 horoj semajnaj.

Por p u b l i k j u r a j e k z a m e n o j, (t. n. ŝtataj) anoncas sin nun tro malmultaj kandidatoj. Eble helpos tiurilate speciala kurso por tiuj kandidatoj aranĝita nun en Praha de la Ĉsl. E. Instituto. Sekve de tio ne venas multaj petoj al nia E k z a m e n a f o n d a j o. Dum tiu ĉi jaro ĝi donis subvencion al unu instruisto.

La traktado pri la interŝtata akordo provizore ĉesis. La situacio por diplomata agado estas certe tre malfacila. Oni devos provi ekaĝi dum alia situcio. Intertempe studas ICK eblecon ekiri al la sama celo per vojo proponita de Dr. Czubrynski.

Al pedagogia biblioteko Komenský ni donacis pere de nia lerneja ministerio portugallingvan d e k a l o g o n eldonitan de lerneja publika autoritato en Brazilo laŭ ĉehoslovaka modelo. Ni ricevis ĝin de la Brazila ligo.

## 15. Propagando ĝenerala.

La plej granda faro tiurilata estis certe la Olomouca k o n g r e s o. Pri ĝi ni raportis detale en Bulteno. Tie ĉi nur estu konstatite, ke el nia dekdu-membra komitato partoprenis ĝin persone 8 anoj, tio estas 2 trionoj, kio per si mem montras konscion pri la organiza devo propravole akceptita. Kaj ni danku sur tiu ĉi loko same al la loka komitato prezidita de s-o Kudela pro la bone plenumita tasko kiom al esp-istaro en nia lando pro tre kontentiga partopreno en tiu ĉi grava manifesto.

Kolektado kaj konservado de a d r e s o j de interesantoj pri esp-o, kiun ni komencis sisteme propagandi antaŭ du jaroj, jam alportas fruktojn. Ĉar ni povas turni nin al ili plurfoje kaj la alvokoj venas de centroj vidigantaj intensan vivon, la intereso ĉe homoj ne tiom facile ekdormas. Bone tion dokumentas informpetoj kaj aliĝoj de tute novaj personon venantaj al niaj funkciuloj kaj en Teritorian oficejon. Tial ni sentas kiel nia devo ripeti la alvokon, ke oni nepre sendu al ni listojn de ĉiuj interesantoj, precipe nomarojn de novaj kursanoj, de membroj de lokaj grupoj kaj simile. Al ĉiuj, kiuj kunlaboris tiamaniere, ni dankas tre sincere.

P r o p a g a n d a s e m a j n o aranĝata samtempe kun GEL fariĝos versimile kontanta entrepreno. Tiun ĉi jaron ĝi havis evidente plian resonon ol jaron pasintan. —La provizo de la novaj Afiŝoj por daŭra apliko estas preskaŭ plene elĉerpita kaj ili pendas ankoraŭ en multaj lokoj efikante sen plua zorgo. Ankau tiu ĉi rapida disvendo de la afiŝoj estas ĝojiga dokumento de esperantista oferemo. — De la flugfolio Pojitko ni disvendis kaj disdonis sume 3000 ekz.

Ni fabrikigis novajn f l a g o j n, prunteblajn malkare por lokaj aranĝoj; ili estis dum la jaro uzitaj en Olomouc kaj en Bělohrad.

Al individua iniciatemo mi helpadis konstante per korespondaj kaj personaj konsiloj, iam ankaŭ per d o n a c o d e m a t e r i a l o p r o p a g a n d a. Enskribitatj estas 12 tiaj sendaĵoj.

Apartan mencion meritas faro de UEA-teritoria oficejo. Ĝi eldonis ĉehlingvan eldonon de p r o p a g a n d a f l u g f o l i o proponita de UEA en origina kaj bona adapto de O. Ginz kun bone informanta alineo pri nia Asocio en 10.000 ekz. vendataj po 20 heleroj afrankite. Teritoria oficejo dissendis ĝin kun siaj kaj niaj presaĵoj al 2500 adresoj. Estas plua bona ekzemplo pri kunlaboro inter nacia asocio kaj UEA.

## 16. Propagando per gazetoj

estas daŭre organizata de nia gazetara servo (estro O. Ginz). Dum jaro 1932 ĝi dissendis 7 cirkulerojn kun 48 artikoloj kiuj estis sendataj al 150 kunlaborantoj. Krom tio ni donas regule senpere informojn al 13 Jurnaloj en Praha. Laŭ la ricevitaj dokumentoj aperis artikoloj pri esp-o en 227 ĉehoslovakaj gazetoj, kio signifas kontraŭ 205 en la jaro 1931 novan kreskon rimarkindan. Detala statistiko aperos en Bulteno kaj en cirkulero al ĉiuj kunlaborantoj. Ni danku tie ĉi al ĉiuj kunlaborantoj pro ilia persisto en laboro kaj menciu aparte f-inon Šupichová, kiu daure prilaboras precipe kampon de porinstruistaj kaj porinfanaj gazetoj.

## 17. Propagando en fakaj rondoj.

Pro la s k o l t a Jamboreo en Hungario ni daŭre persekutis movadon inter nialandaj skoltoj. Samideanoj Csáder kaj Macek zorgas precipe, ke okazu kursoj por skoltaj grupoj kaj povas montri kontentigan rezultaton. Ĝis nun ni ricevis sciigojn pri ekzisto de kursoj en 18 skoltaj grupoj slovakaj kaj 3 hungaraj. Ni komprenebie korespondas kun Hungaria organizanto samideano Balkanyi en Budapest kaj ricevas liajn cirkulerojn. Ni esperas, ke en la Jamboreo estos respektinda areto de skoltoj el ĉehoslovakio parolanta nian lingvon. Nia kunlaboro estis de s-o Balkanyi konstatita en liaj cirkuleroj. — Dum V. internacia k o n g r e s o p o r s e k s a r e f o r m o en Brno (21.—26. IX. 1932) parolis en esperanto ĝia vicprezidanto dana kuracisto dr. Leunbach, la malferma kunveno estis salutita esperantlingve en nomo de Ĉsl. esp-istoj de s-o Bad'ura. La kongresanoj ricevis donace esperantlingvajn gvidlibrojn pri Praha, Tatry, Moravia karsto. — Por anoj de la internacia konferenco de I n t e r n a c i a T r a n s p o r t-l a b o r i s t a F e d e r a c i o en Praha (4.—12. VIII. 1932) aranĝis Internacia Federacio de esperantista Trafik - kaj Transportlaboristaro specialan konferencon pri esp-o en Praha kaj salutvesperojn en Praha kaj Plzeň. — Ni proponis nian kundaborandon al Mezeuropa Instituto. Ĝi estis akceptita kaj ni jam donis al ili instigon tre interesan. — Ni klopodis lau instigo de ICK, ke la F o i r o en Praha denove akceptu favoran sintenadon al esp-o, kiun ĝi vidigadis antaŭ jaroj, precipe ke ĝi ne estu kontraŭ esp-o dum traktadoj de Internacia Unio de Foiroj. Ni ne scias ankoraŭ, ĉu ni sukcesis. — Ankaŭ laŭ iniciato de ICK ni korespondis kun Internacia I n s t i t u t o d e ŝ p a r o en Milano, kies prez. profesoro Ravizza proponis esp-on por propagando de ĝiaj ideoj. Ni atentigis pri tiu iniciato ĉiujn ses ĉehoslovakajn membrojn de la instituto. Kon-

firmis nian leteron sole unu el ili: guvernero de la Nacia banko dr. V. Pospíšil. — Ni restas membroj de Konsilantaro de etikaj asocioj en Ĉeĥoslovakio, kun kiu ni plurfoje rilatis koresponde kaj persone. — Ni persekutas laŭ ebleco nian aferon inter Rotari-anoj. — Kun Ligoj Laborista kaj Katolika ni estis en amikaj rilatoj. Precipe katolika ligo mendis tiun ĉi jaron diversajn niajn eldonaĵojn kaj helpis tiel al ilia disvastigo.

## 18. Propagaondo fremdlanden.

Ni estas en kontakto kun la Nordlanda muzeo en Stockholm kaj preparas por ĝi etnografian materialon pri diversaj fakoj. — Per nia helpo korespondas la ŝtata konservatorio muzika en Praha pri valora antikva muzikaĵo ĉeĥoslovaka trovita en fremdlando.

## 19. Bleier-vojaĝo.

Laŭ peto de eldonisto de Literatura mondo s-ro Vilmos Bleier ni organizis por li paroladvojaĝon. De 26. XI.—4. XII. 1932 li vizitis Bratislava, Brno, Hradec Králové, Praha, Liberec, Mladá Boleslav paj prelegis en la lokaj kluboj pri „Esperanto-literaturo kaj verkistoj". Post prelego li proponis al aĉeto la ekspoziciataĵn librojn de sia eldonejo. Sumo de esp-istoj aŭdintaj tiun prelegon estis sole 215, sed ĉar temis ĉiam pri aktivaj samideanoj, ni estas tre dankaj al s-o Bleier pro lia entrepreno. Intereso pri moderna esperantlingva literaturo vekita per liaj informoj precipe ĉe niaj aktivuloj estas same valora kiom la posedo de la libroj mem.

## 20. Radio.

(komision-estro O Ginz). La sintenado de Radio-Ĵurnalo al esp-o estis pli favora ol antaŭe. Certe ankaŭ influis la kongresa rezolucio prezentita de ni. En aŭtuno 1932 oni komencis elsendi el Brno novan kurson (prof. Kilian). En vintro 1932 komencis en Bratislava sub gvido prof. Vl. Jukl) regula ĉiomontata dissendado de esperantlingva „dounhoro" kun diverstema programo parola, kanta muzika. El Brno oni komencis per paroladoj pri nia respubliko (s-ino Strejčková). Dum la jaro 1932 estis nombro de esperanto-disaŭdigoj: el Brno 24, el Bratisalva 5, el Moravská Ostrava 2. Estas tre verŝimile, ke pri la jaro 1933 ni povos tie ĉi doni nombrojn multe pli gravajn. Ĉiuj esperantlingvaj prelegoj estis efektive aŭskultataj de multaj fremdlandaj esperantistoj, el kiuj multaj konfirmis tion aŭ al ni aŭ al la sendstaciojn. La nombro kaj enhavo de venitaj korespondaĵoj bone influis la koncernajn oficojn. La stacio de Brno publikigis pri la ricevita korespondaĵo longan artikolon en la sia organo, en kiu ĝi konstatas la grandan valoron de la esperanto-disaŭdigoj. La samideanoj, kiuj tiom ofereme kaj prudente helpas nin en nia klopodado akceptu esprimon de tre sincera danko.

Ni peris kelkajn esp. korespondaĵojn de eksterlandaj m a l l o n g o n d a j sendantoj al niaj amatoroj. Niaj membroj evidente ankoraŭ ne ekkomprenis plene la signifon de laborado en tiu sfero.

Estus necese por statistiko enlanda same kiom por internacia ke ĉiu radio-parolanto informu nin pri ĉiu disaŭdigo. Per transdono de tiaj sciigoj al koncernaj lokoj ni povas forte akceli la aŭskultadon kaj tiel la sukceson de tiuj aranĝoj.

## 21. Turismo

(komision-estro dr. Pitlik). Car unua eldono de luksa gvidfolio pri Praha baldaŭ estis elĉerpita ni aperigis duan eldonon redaktitan kiel la unua de s-o Bouŝka. Ni disvastigidis ĝin laŭeble plej celscie, ke ĝi antigu efektivajn turistajn interesantojn el fremdlando, ne kolektantojn. Tial ni dissendadis ĝin laŭ adresoj prudente elektataj kaj konfirmoj kaj alia korespondado el tio rezultinta pruvas, ke ni ofte sukcesis tiurilate. — Por korespondaj celoj de ĉsl esp-istoj ni eldonis poŝtkarton kun skizita landkarto de la respubliko vidiganta kvar landojn kun mallonga informa teksto. — Fervoja ministerio eldonis tre lukse persitan ‚ilustritan gvidlibron tra linioj de ĉeĥoslovakaj ŝtataj fervojoj" verkitan de dr. Jos. Bělohlav, tradukitan de Fr. Slavík. Ĝi enhavas 140 bildojn kaj 11 geografiajn kartojn. Ĝia eldono signifas novan gravan uzon de esp-o por oficiala celo. Ministerio disponigis al ni certan kvanton por dissendi laŭ adresoj de seriozaj interesantoj precipe en la najbaraj ŝtatoj, el kiuj povus veni vojaĝantoj per ĉsl fervojoj. Ankaŭ mem dissendas ministerio la gvidlibron laŭ tiu ĉi principo. ICK dankis al ministerio pro ĝia larĝvida uzo de esp-o kaj ni mem ĝojas pro civitana fiero, ke nia alta aŭtoritato publika scias ŝati modernajn ilojn. — J. Scherer, farinta paroladvojaĝon tra nia respubliko, prelegis publike en aŭtuno 1932 en sia hejmo en Los Angelos 2 foje pri la ĉefurbo Proha. — Esp-isto vivinta plurajn jarojn ĉe ni profesoro Frant. Novljan havis vicon de prelegoj pri nia respubliko en Esp-ista klubo en Bjelovar (Jugoslavujo). — Al kongreso en Olomouc aranĝis fervoja direkcio en Praha karavanon de kongresanoj, kiun partopresis 23 p. Al kongreso Pariza ni aranĝis karavanon per la Reprezentejo de la francaj fervojlinioj en Praha, kun kiu iris 38 personoj. Ambaŭ karavanoj estis je malalta prezo kaj ĉiuj partoprenintoj estis kontentaj. Preparis kaj gvidis ambau s-o Ginz kun konata lerteco kaj konscienceco. Partoprenantoj de ambau karavanoj entreprenitaj unu de la fervoja direkcio, dua de la oficiala vojaĝoficejo signifas multe pli gravan kontakton kaj interesigon de fervojo ol multaj memorandumoj kaj rezolucioj. — Kiel la jarojn pasintajn ni ankaŭ dum tiu ĉi jaro donadis turismajn informojn al eksterlandaj interesiĝantoj kaj niaj komitatanoj ofte servis la alvenintajn. — Pri la stacidomaj tabuloj ni laboras.

## 22. Informado de fremdlando pri situacio de nia ŝtato kaj nacio.

Niaj membroj ofte donas tiajn informoj al siaj fremdlandaj korespondantoj. Tiun ĉi jaron decas enskribi aktivecon de nia asocio ankaŭ en tiu kampo. Ni korespondis kun redakcio de H e r o l d o, kies kelkaj artikoloj ne ŝajnis al ni sufiĉe informantaj. — Ni disvastigis per helpo de influaj esp-istoj informojn pri sukcesoj de ĉeĥoslovaka administro en Subkarpata Rusio por paralizi la malĝustajn sciigojn pri la tieaj mankoj. — Dum la Pariza kongreso ni disdonis grandan kvanton de ĉiuj disponeblaj presaĵoj pri Ĉeĥoslovakio.

## 23. Literaturaj aferoj

(komision-estro Hromada). Ni iniciatis, ke Literatura mondo dediĉu unu numeron al ĉeĥoslovaka literaturo kaj arto. Ĝi aperis kiel 12-a n-ro de la dua jarkolekto (decembro 1932), redaktita de s-o O. Ginz, kiu faris ankaŭ la ceterajn aranĝojn. La kliŝaĵojn pruntis ministerio fremdlanda. La artikolojn kaj tradukojn de publikigitaj literaturaĵoj verkis gesamideanoj: Echtner, Echtnerová, Ginz, Ginzová, Hromada, Kamaryt, Květoň, Lukáš, Koutek, Sklenčka, Sklenčková. La subvencion de la fremdlanda ministerio ni uzis por aĉeti kaj dissendi tiujn numerojn al fremdlandaj interesantoj. La subvencio ne sufiĉis por tio, ni alpagis el nia kontanta mono. La numero estis donace sendita kun informa letero el 131 konataj adresoj en 57 landoj.

Al Vrchlický muzeo ni donacis tradukon de „Nokto en Karlův Týn". — La laboroj pri Ĉeĥoslovaka antologio ne ĉesis, sed progresas malrapide.

## 24. Sciencaj aferoj.
**(Komision-estro Kamaryt).**

Šupichová kaj Kamaryt kolektis kaj kontrolis testojn pri esp-o-instruado kaj sendis ilin al Pedagogia instituto de la ĝeneva universitato, de kiu ili estis komisiitaj. — Ni kontrolis plurajn publikaĵojn laŭlingve antataŭ preso. — Dr. Kamaryt akceptis kunlaborandon en Enciklopedio de E. eldonota de Literatura mondo por verki artikolon pri movado en ČSR. kaj biografietojn de nialandaj esp-istoj. — Dr. Kamaryt korespondis kun universitata profesoro esprimiinta nefavoran opinion pri nia movado. — Ni daŭre funkciis kiel nacia peranto de I. Scienca Asocio. E.

## 25. Junularo
(komision-estro V. Echtner). Komisiono starigita en aŭgusto 1932 okupas sin pri junaĝaj adeptoj de esp-o kaj ĉiamaniere klopodas ligi ilin daŭre al la movado. En tiu ĉi kommenca periodo de sia agado ĝi efektivigadis tion per korespondado kaj per regula, laŭeble ofta sendado de esp-aĵoj por lerneja junularo taŭge elektitaj. Ĝis nun estas kolektitaj 78 adresoj de infanoj aŭ gejunuloj perskaŭ ĉiuj el la provinco. Aliris 109, eliris almenaŭ 113 korespondaĵoj krom pli ol 280 presaĵoj. (ŝlosiloj, glumarkoj, sokolfestaj prospektoj, gvidlibroj pri Wien kaj Praha, esp. kalendaroj 1933 k. s.). La ricevita korespondo enhavas petojn pri adresoj por internacia korespondado, pri korekto de tekstoj, pri informoj, mendoj de libroj, gazetoj, insignoj, aliĝoj al ĈAE, demandoj pri organizo ktp. En kelkaj lokoj oni trovis tutajn grupojn de junaj espistoj provizore neorganizatajn (Česká Skalice, Uherský Brod, Kežmarok). La komisiono akiris la kunlaboron (memvolan) de tri instruistoj fino Margit Feldmannová (Zlaté Moravce), s-ro Aug. Adam (Česká Skalice), f-ino Elni Tamminen (Helsinki), kiuj helpis i. a. aranĝi interŝanĝon de kristanskaj salutkartoj inter finnaj kaj ĉeĥoslovakaj infanoj registritaj de la komisiono. Ni danke kvitancas la donacon de: 40 gvidlibroj pri Praha (E. K, en Praha) 50 gvidlibroj pri Wien (s-ro H. Steiner en Wien), 65 ekz. de diversaj flugfolioj, prospektoj kaj gazet-numeroj (ges-roj Sklenčka), glumarkoj (firmaoj Chmel kaj Böhm), 50 kalendaroj (Heroldo), 28 ŝlosiloj 100 poŝtmarkoj po 20 heleroj, ĉiuj necesaj kovertoj kaj skribmaterialo, 2 lernolibroj de Šupichová (la komionestro kaj lia edzino).

Praha la 23-an de februaro 1933.

Komitato de ĈAE:

Dr. Stan. Kamaryt, prezidanto.

Jaroslav Šustr, ĝen. sekretario.

SLOV. GRAFIA, BRATISLAVA

# Financa raporto pri 1932

## XIII. administra jaro de ĈAE.

| | | | Aktivoj | | Pasivoj | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | Kč | h | Kč | h | Kč | h |
| **Ferma bilanco:** | | | | | | |
| 1. Mono en la kaso | | | 1.211 | 40 | | |
| 2. Mono en la pošta šparkaso, Praha | | | 1.178 | 75 | | |
| 3. Mono en Záložna peněžního úřednictva, Hradec Králové | | | 2.678 | 95 | | |
| 4. Inventario (post depreno de amortizo) | | | 1.700 | — | | |
| 5. Diversaj entreprenoj: Ĉsl. numero de Literatura mondo | | | 2.736 | — | | |
| 6. Disvendotajoj | | | 994 | 85 | | |
| 7. Diversaj Debitoroj et Kreditoroj | | | 2.503 | 55 | 1.552 | 90 |
| 8. Transitivoj: kotizoj pagitaj por 1933, 1934, 1935 | | | | | 876 | — |
| kotizoj pagitaj por 1933 Studenta Sekcio | | | | | 18 | — |
| 8/10 de la imposta ekvivalento | | | 228 | 30 | | |
| 9. Asocia kapitalo | | | | | 10.784 | 90 |
| | | | 13.231 | 80 | 13.231 | 80 |
| **Bilanca Perdo-Gajno:** | | | | | | |
| 1. Membraj kotizoj | | | | | 5.296 | — |
| Membraj kotizoj - Studenta Sekcio | | | | | 84 | — |
| 2. Elspezoj de administrado: | | | | | | |
| a) afranko | 1.248 | 35 | | | | |
| b) materialo | 679 | 80 | | | | |
| c) vojaĝoj | 1.338 | 70 | | | | |
| d) impostoj | 48 | 50 | | | | |
| e) diversaj etaj | 180 | 45 | 3.495 | 80 | | |
| 3. Elspezoj de propagando: | | | | | | |
| a) afranko | 1.328 | 95 | | | | |
| b) materialo | 534 | 90 | | | | |
| c) gazeteltondajoj | 420 | — | | | | |
| d) Bulteno No 41—47 | 2.687 | 50 | | | | |
| e) diversaj ettaj | 6 | — | | | | |
| | 4.977 | 35 | | | | |
| f) venditaj Pojitko | 61 | 30 | 4.916 | 05 | | |
| 4. Diversaj entreprenoj | | | | | 508 | 65 |
| 5. Disvenditajoj | | | | | 64 | 35 |
| 6. Administraj elspezoj de la studenta Sekcio | | | 53 | 95 | | |
| 7. Diversaj elspezoj et enspezoj | | | 383 | 40 | 5.391 | 05 |
| | | | 8.849 | 20 | 11.344 | 05 |
| Jara gajno | | | 2.494 | 85 | | |
| | | | 11.344 | 05 | 11.344 | 05 |
| **Asocia kapitalo:** | | | | | | |
| Stato la 1-an de Januaro 1932 | | | | | 8.290 | 05 |
| Jara gajno | | | | | 2.494 | 85 |
| Stato la 31-an de Decembro 1932 | | | | | 10.784 | 90 |

Nombro de kasaj dokumentoj . . . 262

Jara spezo (unuobla) . . . Kč 108.793.45

*Hradec Králové, 31. Decembro 1932*

*Otto Sklenčka*
kasisto